



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI – la 1-an de Majo 2023

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Inbar Mor.

Zome: Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.

Telefona: Mikaelo Lineckij.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

a) **Jehoŝua:** mi prizorgis nian reprezentadon (kaj la florkronon) en la memor-ceremonio pri Holokaŭsto en *Yad- Vashem* – Chaja Peer kaj Laurin Lewis – dankon al ili. Kiel ĉiam bele prezentis ilin Esperante Beni Hendel.

b) **Amri:** ĵus okazis tre interesa kaj sukcesa virtuala kunveno pri la IK kun partopreno de multaj eksterlandanoj, inkluzive la plimulton de la postkongresanoj.

c) Pro samtempa ĉiĉeronado Amri ne sukcesis fizike alveni kaj petis de Dror helpi per ties komputilo. Tamen evidentiĝis, ke ne eblas projekcii el la komputilo de Dror al la mura ekrano en la kunsido, ĉar Dror ne havas la necesan adaptilon. Propono: Ŝlomo pripagu la aĉeton de la adaptilo.

2. La 23-a Israela Kongreso en Tiberiado – konkludoj (Amri)

a) **Inbar:** Estis kelkaj malfacilaĵoj pri la manĝado. **Jehoŝua:** Estu matenmanĝoj en la hoteloj dum la venontaj kongresoj – eĉ se la kostoj estos iom pli altaj. Ni devos antaŭkontroli la kondiĉojn kaj mi pretas fari ĉi tion surloke. **Eran:** laŭ la prezo la kondiĉoj estis adekvataj. **Amri:** mi nur koncize respondas (pli detalan raporton mi eble faros skribe). Mi mem aĉetis kaj alportis provizon por tri matenmanĝoj. Ĝi estis simpla, je nivelo de junulargastejo, sed sufiĉa. Mi kaj granda parto de la partoprenantoj uzis ĝin, kaj pluraj laŭdis la iniciaton. Por la ceteraj kongresanoj mi anticipis kunordigis (kaj informis) rabatitan matenmanĝon en la kafejo *Sambusak Bair* vidalvide al la hotelo. Mi kun ĉ. dek kongresanoj vespermanĝis tie sabate vespere (ĉar la mendita restoracio estis fermita, sed ne informis) kaj estis tute kontentige.

b) **Amri:** la buĝetoj, kaj de la IK kaj de la PK, (videblaj detale sur la ekrano) estas balancitaj. Se la lastmomentaj nuligintoj, por kiuj ni jam devontiĝis ĉe la hoteloj, pagos la nuligokostojn, ni estos kun ioma pluso. **Jehoŝua:** venontfoje ni devos esti pli singardaj el tiu vidpunkto. **Amri:** singardaj en la senco insisti pri antaŭpago de eksterlandanoj (estis nur unu kazo); kaj ĉe israelanoj (temas pri tri) ni devos admoni pri posta nuligpago, por ilin eduki venontfoje esti pli respondecaj.

c) **Amri:** la bildoj jam videblas en *Facebook*. Por tiuj, kiuj ne aliras ĝin, Dror preparu deponejon por bildoj, kie oni povos ilin elŝuti kaj vidi per nia retejo.

ĉ) **Amri:** malbonan sperton havis Martha Otto, prirabita de taksiisto, kiu postulis 1,400 NIS (anstataŭ 600) kaj rifuzis doni kvitancon survoje al Tiberiado merkrede (la dua Paskotago). Al ĉiuj eksterlandanoj ni devos enkapigi, ke NE estas publika transporto en Israelo dum festotagoj



kaj semajnfinoj, kaj se ili tamen devas alveni dum tiuj tagoj, ili informiĝu ĉe loka e-isto por eviti tiajn friponaĵojn.

3. Landa Kunveno (Jehoŝua)

Jehoŝua: ĝi devas okazi dum Junio. Ĉar la venonta Estrar-kunsido estos la 5-an de Junio, do la taŭga dato por la LK estas lunde, la **19-an de Junio**. Ni estos fizike en la kunvenejo de nia oficejo (Alon-Turo-2), kaj eblas ankaŭ zoma partopreno. Ni kunvenu ekde la 18h00, komencu oficiale je la 18h30. **Ŝlomo** devos prezenti siajn financaĵojn. **Inbar** jam volontiĝis por la arta parto.

4. Magazeno por la libroj de ELI – urĝeco (Ŝlomo, Jehoŝua)

Jehoŝua: Ĥanoĥ, la frato de Jinon Meiri informis min, ke la familio planas luigi la domon. Eble estos provizora solvo, ke la libroj restu en ŝlosita balkono, sen alireblo de la luanto. Ŝlomo esploros telefone pli iu neŭzata lernejo en sia kibuco – ĉu ni povus lui tie lokon por la libroj.

5. Israela Esperantisto (Mikaelo, Amri)

Amri: kun la raportoj pri la IK kaj PK, laŭ la skemo por 44-paĝa duobla numero kiun mi sendis kelkajn tagojn antaŭ la IK, estos sufiĉe da materialo. Nun ne estas akurata limdato por fini ĝin, ĉar ni ne antaŭvidas, ke multaj venos fizike al la LK en Junio. Se **Mikaelo** konsentas plue preni la laboron por la duobla numero, eblas ev-e fari eĉ 48-paĝan. **Jehoŝua** devos prepari jam 5 nekrologojn, proksimume same longajn, kun fotoj; kelkajn helpe de Michal Amir kaj aliaj. Tiuj bezonus almenaŭ unu paĝon kaj duonon. **Gabi:** mi povas traduki unu paĝon aŭ pli da ŝerĉoj, la redaktoro elektu.

6. La venonta, 24-a IK (Amri)

Amri: konsidereblaj, proponataj lokoj – Jerusalemo (*Hostelo Jerusalem*), aŭ Jeruĥam en la Sudo. Mi konas ambaŭ lokojn, interesiĝos kaj informos.

La venonta kunsido: lunde, la 5-an de Junio 2023, je la 20:00

Protokolis: Gabi Zeevi